# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban - **PERPIGNAN** (P.-O.) - Téléfono 34-38-84

32 ---------------------- Jara Abono : 2 F -------------- 2a Trimonata 1969

32

C.C.P. 956 28 MONTPELLIER .

--oooOooo--

## " TAGO DE ESPERANTO EN PERPIGNAN "

La dimanĉon, 8 an de junio, en Perpignan, la " tago de Esperanto " multe sukcesis. Efektive, la organizantoj antaŭvidis nur 50 ĉeestantojn kaj, pli ol cent personoj vizitis la kongreson.

Je la 10-a matene, multajn esperantistoj eniris en " Hotel Pams " kaj, tuj hispanoj kaj francoj interbabilis en la internacia lingvon.

S-ro René LLECH-WALTER legis la letersalutojn de U.E.A., I.O.E., H.E.I., J.E.F.O. kaj de multaj samideanoj el la du landoj, kaj bonvenigis la ĉeestantaron. Poste, D-ro Miguel SANCHO-IZQUIERDO el Zaragoza, Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio parolis pri la historio de la movado en Hispanujo.

Finfine, D-ro André ALBAULT el Toulouse, Prezidanto de Franca Unuiĝo por Esperanto, prelegis pri Esperanto kaj evoluado de la lingvoj tra la mondo, lian festparoladon varme aplaŭdis la kongresanoj.

Je la 12-a, la Deputito-Urbestro de Perpignan ofertdonis honoran vinon al la partoprenantoj en la Kongresa Palaco, ĉe la elirejo de la Komerca Ekspozicia Foiro.

Je 13 h 30, en la restoracio " Le Rallye ", amikan bankedon gustumis la esperantistoj dum kiu gaja atmosfero regis.

Poste, je la 5-a vespere, ĉiuj foriris per aŭtobuso por viziti la ŝipon " Lydia " inter Le Barcarès kaj Leucate.

Tiu internacia renkontiĝon permesis plifirmigi la ligilojn kiu ekzistas inter la esperantistoj el la du flankoj de la Pireneoj.

Venontan jaron, la hispana-franca renkontiĝon okazos norde de

RAPORTO PRI LA FEDERACIA KONGRESO EN PEZENAS LA 23a DE MARTO 1969.

= = = = =

Pro la inundoj la kongreso komenciĝas kun ion da prokrasto.

Nome de la Montpellier'a grupo F-ino Hortolan bonvenigas la kongresantojn sed devas forlasi la kongreson por organizi la tagmanĝon.

La Prezidanto S-ro Llech-Walter, forestanta, sendis senkulpigantan leteron. Doktorino Vierne estas elektita por prezidi la kongreson anstataŭ la Prezidanto.

La prezidanto legas la tagordon.

1) agada raporto

2) financa raporto

3) diversaj aferoj

1) agadraporto : ĝi ne estas preparita.

2) financa raporto : la financa raporto aperita en la lasta numero de Sudfranca Stelo estas akceptata.

3) Vivo de la grupoj.

Perpignan : F-ino Verry raportas kaj invitas al la renkonto kiu okazos en Perpignan kun Hispanoj la 8an de junio.

Narbonne : raporto de S-ro Loubic.

Beziers : S-ino Authier parolas pri la agado kaj ŝi invitas al filmprezentado la 30an de aprilo.

Montpellier : S-ro Lentaigne anoncas ke la federacio Herault ricevis por la dua fojo 1000 frankojn.

Alès : S-ro Raynaud anoncas la kreon de la departementa federacio Gard.

Oni decidas ampleksigi la federacian komitaton. Ĉiu respondeculo estos helpata de sia vic-o : kiam iu ne povos plenumi sian taskon, lia vic-o anstataŭos lin. Sekve pliboniĝos la federacia vivo.

La novelektitaj komitatanoj estas :

F-ino Verry kaj S-ro Llech-Walter el Perpignan

S-ro Loubic kaj S-ro Deligne el Narbonne

F-inoj Bony kaj Vierne el Montpellier

S-roj Angevin el le Cailar (Gard) kaj Frus el Nimes.

## VIVO DE LA GRUPOJ

### NOVA GRUPO EN VERGEZE ( GARD )

Le foyer des jeunes " La Capitelle " a ouvert ses portes le 16 septembre 1968. Dès le 1er octobre un groupe de jeunes a été constitué pour apprendre l'Esperanto.

Au début ce groupe comptait 3 filles et 3 garçons. Les cours ont eu lieu tous les mardis et tous les vendredis de 19 à 20 Heures.

Le cours a fonctionné régulièrement et 3 filles et 1 garçon ont terminé l'étude du livre : 1er degré. A présent il s'agit de" fréquenter " d'autres espérantistes afin de faire des progrès en vocabulaire.

Nous regrettons cependant de n'avoir pu réaliser ce que nous avions projeté au départ. En effet nous avions l'intention à la fin du cours de correspondre chacun avec 2 jeunes de moins de 30 ans, de leur adresser un questionnaire afin de faire une exposition sur " les jeunes dans le monde ." Mais il ne nous a pas été possible d'avoir des adresses de correspondants. Il serait souhaitable d'avoir 8 correspondants dans des pays différents afin"d'accrocher" définitivement ces jeunes gens un peu déçus et un peu refroidis par cette étude livresque.

Dès la rentrée de septembre nous espérons prendre contact avec d'autres esperantistes. Peut-être aurons-nous d'autres adhérents.

Le groupe a été dirigé par Mr Césarano, instituteur retraité, animateur culturel du foyer qui par ce fait a réappris l'Esperanto qu'il avait abandonné depuis plusieurs années.

....

ooOoo
O

Signalons que le foyer de Vergèse est ouvert jusqu'au 31 juillet et réouvrira à partir du 15 septembre.

Il sera possible d'avoir une journée Esperanto dans ce foyer, ce qui sera en même temps qu'une rencontre agréable et enrichissante linguistiquement et à tous point de vue, un moyen d'encourager ces jeunes débutants et peut-être de susciter des inscriptions à un nouveau cours parmi les autres jeunes du foyer ou même parmi les jeunes du village.

BEZIERS

Dum tiuj-ĉi lastaj monatoj, la vivo en Béziers estis kvieta. Tamen la kursoj regule okazis. Lernantino gajnis stipendion por ĉeesti la Sat-Amikaran kongreson en Parizo. Tri aliaj membroj de la grupo ankaŭ partoprenis la saman kongreson.

La venontan someron, kvar grupanoj partoprenos kulturajn semajnojn en Gresillon.

Stipendio rekompencos alian lernantinon por la restado en gresillon.

La jara publika kunveno okazis la 30-an de marto. La ĉeestintoj vidis diapozitivojn pri Skotlando kaj Nederlando, kaj poste du tre interesajn filmojn : komprenebla esperanta teksto akompanas diapozitivojn kaj filmojn. Dum la lasta monato la sama prezentado okazis en la liceo de junulinoj.

Nun la labora jaro finiĝas. La venonta jaro alportos multe da laboro al la grupanoj ĉar la S.A.T. Amikara kongreso okazos en Beziers.

Ni donos aliajn informojn pli malfrue.

oo8oo

MONTPELLIER

La monataj kunvenoj regule okazis.

Ni akceptis kiel kutime eksterlandanojn : svisan paron kaj niajn montpellier-amikojn Schewerin el Aŭstralio kiuj jam vizitis nin antaŭ du jaroj.

Nia grupo montris sian viglecon sendante partoprenantojn al ĉiuj esperantistaj renkontoj de la regiono : Lézignan-Corbière, Avignon-Courtine, Perpignan. Ni ne forlasis la kongresojn : montpelieranoj ĉeestis la federacian kongreson en Pezenas; la naciaj en Parizo kaj Strasburgo, la internacia de I.L.E.F. en Avignon.

Feliĉulojn preparas la vojaĝon por la internacia kogreso en Helsinki.

o888o

ALES

Dum tiu lasta lernej-jaro kursoj por plenkreskuloj funkciis ĉiusemajne, alterne elementa kaj perfektiva.

Ni partoprenis ĉiujn esperantajn manifestaciojn :
- departamenta asembleo en Nimes ( 15-XII-69 )celo al kreo de Gard'a federacio.
-interregiona renkontiĝon en Avignon ( 16-II-69 ) initiata de S-ino Humm kaj nia amiko Pelletier.
- federacian kongreson en Pézenas ( 23-III-69 ) organizita por la grupo Montpellier
- internacian kongreson de I.F.E.F. en Avignon ( 17-V-69 )
- hispan-francan renkontiĝon en Perpignan ( 8-VI-69 )
- kaj nia samideanino F-ino Noguier vizitos la 55-an U.K. en Helsinki.

Kiel vi legos en aparta rubriko, terura malbeno funebrigis nian rondeton.

Aliparte ni bedaŭrinde devis registri kvar forirojn ;
- Ge-roj Santamaria, F-ino Villemin kaj lastatempo S-ro Sauzet poŝt-oficestro en Cendras kiu emeriĝinte loĝas de nun en Gargas ( Vaucluse ). Feliĉe ili ne perdiĝis por la novado kaj tio iomete konsolas nin.

La riparoj en la eks-min-lernejo kiujn entreprenis la urbestraro baldaŭ finiĝos kaj ni esperas havi en oktobro, sidejon kaj kursĉambron en tiu nova domo por kulturaj asocioj.

....

o8o8o

NIMES

La grupo regule kunvenas.

Tri membroj partoprenis la francan-hispanan renkontiĝon en Perpignan

o8o8o

## NIA FAMILIA VIVO

--ooOoo--

### Nekrologo

La 27an de Junuaro mortis, pro aùtomobila akcidento, nia juna samideanino Christiane FERRASSE, instruistino en LES SALLES DU GARDON.

Jam eklerninte Esperanto ŝi aliĝis al nia grupo.

Ni konservos pri tiu afabla kaj simpatia samideanino la plej bonan memoron.

### Geedziĝo

Nia samideanino Hélène Villemin, el LA GRAND'COMBE, kies ankaù gepatroj estas esperantistoj edziniĝis al S-ro Michel Delmas el PANTIN, la trian de Aprilo.

Al la juna par ni deziras feliĉon kaj prosperon .

### Naskiĝo

Kun ĝojo ni eksciis la naskiĝon de "Gylaine" dua infano de niaj amikoj gesinjoroj LUCIEN-FABRA de Montpellier.

Ni deziras al Guylaine feliĉon kaj prosperon.

o888o

### Féderation Départementale du Gard
### Pour L'Esperanto

Ni rememorigas ke ĝia celo estas unuiĝi ĉiujn Gard'ajn esperantistajn grupojn kaj esti ligilo inter la grupoj kaj la izolitaj esperantistoj.

Kiuj ne ankoraù pagis sian kotizon bonvolu ĝiri 4 frankojn al la postĉekkonto :

Fédération départementale du Gard

Pour l'Esperanto

Montpellier 185 707

Ili ricevos la trimonatan bultenon

" Sudfranca Stelo "